

Deziroj - vortoj por la vivo el <http://www.movado-sen-nomo.net/>
de Max Ehrmann

Iru serene meze de la bruo kaj la hasto kaj memoru kia paco povas esti en silento.

Kiom ajn eblas, sen kapitulaci, estu en bonaj rilatoj kun ĉiuj homoj. Parolu vian veron trankvile kaj klare, kaj aŭskultu aliajn, eĉ la tedajn kaj malklerajn; ankaŭ ili havas siajn rakontojn.

Evitu laŭtajn kaj agresemajn homoj, ili estas maltrankviligaj al la spirito. Se vi komparas vin mem al aliaj, vi povos fariĝi vanta kaj amara, ĉar ĉiam estos pli grandaj kaj malpli grandaj personoj ol vi mem. Ĝuu viajn atingojn kaj viajn planojn.




La partopenantoj de la 15-a Rata Rendevuo en Paderborn, 10/2018

multaj homoj strebas por altaj idealoj, kaj ĉie la vivo estas plena je heroeco.

Estu vi mem, precipe ne ŝajnigu afekcion. Nek estu cinika pri amo, ĉar malgraŭ ĉiu arideco ĝi estas longdaŭra kiel herbo. Akceptu afable la saĝecon de la jaroj, gracie cedante la aferojn de juneco. Nutru la forton de la spirito por protekti vin kontraŭ subita malfeliĉo. Sed ne perturbu vin mem pro imagoj. Multaj timoj naskiĝas de laceco kaj soleco.

Krom saĝa disciplino, estu milda al vi mem. Vi estas infano de la universo, ne malpli valora ol la arboj kaj la steloj; vi havas la rajton esti ĉi tie. Kaj ĉu aŭ ne estas klare al vi, ne ekzistas dubo pri tio ke la Universo disfaldiĝas tiel kiel ĝi devus.

Tial estu paca kun Dio, kia ajn vi koncipas Lin; kaj kiaj ajn viaj laboroj kaj aspiroj, en la bruema konfuzo de la vivo, konservu pacon en via animo. Malgraŭ ĉiuj ĝiaj ombroj, malpuraj kaj rompitaĵoj, ĝi daŭre estas bela mondo. Estu gaja. Strebu esti feliĉa. © Max Ehrmann, 1927.



Restu interesata pri via kariero, kiom ajn humila; ĝi estas valora afero en la ŝanĝigema fortuno de la tempo. Praktiku singardemon en viaj komercaj aferoj, ĉar la mondo estas plena je trompoj. Sed ĉi tio ne blindigu vin por ĉiu virto kiu ekzistas;



Klubanoj kaj muzikistoj dum koncerto de Kajto kaj Kapriol' en la OKAL-kafejo en Lauenstein, 11/2018





RATKAPTISTA KURIERO
INFOILLO DE LA RATKAPTISTA BANDO
NUMERO 61
Kontakt: Heinz W. Sprick
www.esperanto.de/hameln

FEBRUARO 2019
hameln@esperanto.de
Tel: 0162/7536396

Termine 2019 mittwochs 19.30-21.30 Uhr

Sumpflume Hameln

**2019: 9. Jan., 23. Jan., 30. Jan., 13. Feb., 27. Feb., 13. Mrz., 27. Mrz., 10. Apr., 24. Apr., 8. Mai, 22. Mai, 29. Mai, 12. Jun., 26. Jun., Sommerpause, 14. Aug., 28. Aug., 11. Sep., 25. Sep., 9. Okt., 23. Okt., 30. Okt., 13. Nov., 27. Nov., 11. Dez., Weihnachtspause, Das aktuelle Programm unter: www.esperanto.de/hameln
28. Juni: Gartenfest in Bensen; 29. Sep.(?): Rata Rendevuo; 13. Dez.: Weihnachtsfeier im Pfannekuchen**

Neuer Esperanto-Kurs startet am 13. März 2019!

Vi ne estas sola en la mondo.

el <http://www.movado-sen-nomo.net/>



Vi ne estas sola en la mondo.

Imagu ke bona amiko via aŭ proksima familiano havas gravan problemon, sed vi aŭdas pri tio nur longe poste. Kredeble via unua reago estas "Kial vi ne parolis pri tio? Mi estus povinta helpi!" Same inverse: se vi havas problemon, eble vi povus paroli pri tio kun bona amiko aŭ proksima familiano. Ni ne estas solaj en la mondo, ni ĉiuj havas socian reton. Ne ĉiuj havas 10 bonajn geamikojn, foje nur 1 aŭ 2, kaj tio povas esti sufiĉa. Kaj foje, iu persono kiun vi malpli bone konas, povas doni tre trafan konsilon aŭ oferti sian subtenon en la ĝusta momento kaj fariĝi tre bona amiko por la vivo. Do ne izolu vin mem, ne timu "ĝeni aliajn homojn" per viaj problemoj.

Jubilea festo kun koncerto kaj dancado en la Sumpflume 11/2017



iĝinta Reĝlando; **29.-31.3. Klerigmodulo de GEA, Herzberg/Harz;** 29.-31.3. PEJ-semajnfino, Lodzo, Pollando; 1.4.-31.5. Esperanto-Plaĝo, Cullera (Valencio), Hispanio, kun Dennis Keefe; **11.-15.4. 20-a Israela E-Kongreso + MONA-kunveno en Eilat, Israelo kaj Akaba, Jordanio, poste ekskursoj;** **12.-14.4. 15-a BIERo, Chotěboř, Ĉeĥio;** 12.-16.4. Kunkongreso de EAB kaj Esperanto-France, Dover, Britio; 12.-16.4. Korusa renkonto de Interkant' + LandArt, Arto kaj Naturo kun Nathalie Dubrulle, Baugé, kastello Grésillon, Francio; **15.-22.4. PSI - Printempa Semajno Internacia, Hochspeyer;** 17.-23.4. IJF Internacia Junulara Festivalo, Viserbella apud Rimini, Italio; 18.-22.4. PEKO, Verdaj Skoltoj, Simmerath apud Aachen; 20.4. 50-a (Jubilea) Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, Rotterdamo, Nederlando; 25.-28.4. 9-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto, Danang, Vjetnamio; 26.-28.4. Ŝĉecina Esperanta Printempo 2019, Szczecin, Pollando; 26.4.-4.5. 9-a PRINTEMPaS, Baugé, Francio; 1.-5.5. 78-a Hispana Kongreso de Esperanto, Málaga, Hispanio; 1.-5.5. OSER-50, Tomsk, Siberio, Rusio; 1.-9.5. Mirinda Lviv, Lvov, Ukrainio; 3.-10.5. 71-a IFEF (fervojistoj) Esp.-Kongreso, Málaga, Hispanio; 9.-12.5. TEK - Tutsllovakia Esperanto-Kongreso, Liptovský Hrádok, Slovakio; 10.-12.5. Printempa Esp.-Renkonto, Strasbourg, Francio; 114-a Skota Kongreso de Esperanto, Carnwath, Lanark, Skotlando; 25.5. Migrado tra la arbaro Domholz, Schkeuditz; 25.-26.5. Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, Vroclavo, Pollando; **29.5.-2.6. 60-a BARO, Hameln;** 29.5.-2.6. Polyglot Gathering 2019, Bratislava, Slovakio; **7.-10.6. 96-a Germana Esp.-Kongreso, Neumünster;** **7.-10.6. 25-a KEKSO, Neumünster;** 10.-16.6. Esperanto-Tendaro, Kievo, Ukrainio; 22.6. LiRe Lima Renkontiĝo, Schoena + Stadt Wehlen; **22.-30.6. BEMI-semajno (biciklistoj), Herzberg/Harz;** **28.-30.6. Klerigseminario, Herzberg/Harz;** 29.6.-7.7. Roskilde-Festivalo, Roskilde, Danio; 29.6.-8.7. NASK 2019, Raleigh, NC, Usono; **6.-14.7. 55-aj Baltiaj Esp.-Tagoj BET, Panevežys, Litovio;** **7.-21.7. Esp.-somerkursoj, Herzberg/Harz;** 8.-14.7. Esp.-Tendaro, Odessa, Ukrainio; 8.-18.7. 3-a Maratona Esp.-kursaro, Esp.-Kastelo Greziljono, Baugé, Francio; **12.-20.7. SES Somera Esp.-**

Esperanto-Kalender:

www.eventoj.hu/kalendaro.htm

2019: 26.2.-8.3. 13-a Internacia Himalaja Renkontiĝo, Katmanduo, Nepalo; **27.2.-3.3. Bibliaj Tagoj, Mainz;** 2.-9.3. Mediteranea Esperanto-Semajno, Restadejo Val d'Esquiere, Les Issambres, Francio; **18.-22.3. Esp.-kurssemajno (Bildungsurlaub), Herzberg/Harz;** 22.-24.3. Esperanto Stud-semajnfino, Krikkhaar, Bornebroek, Nederlando; 28.-31.3. 12-a Mezorianta Kunveno, Kaŝan, Irano; 28.3.-1.4. Mez-Anglia Semajnfino Esperantista, Wellesbourne, Unu-

Studado, Nitra, Slovakio; 13.-19.7. IEK Internacia Esp.-Konferenco, Kondoros, Hungario; 13.-20.7. 52-a ILEI-Kongreso (instruistoj), Čačak, Serbio; 13.-21.7. SEFT Somera Esp.-Familia/Feria Tendaro, Thomsdorf; 14.-20.7. Ekskurso tra la tri baltaj landoj; 15.-21.7. Tihvinaj Esp.-Metiejoj TEMoj, Tihvin apud Peterburgo, Rusio; **20.-27.7. 104-a UK Universala Kongreso de Esp. + Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Lahtio, Finnlando;** 22.-27.7. ĜUPR Ĝuu Pragol, Prago, Ĉeĥio; 22.7.-1.8. 41-a REF Renkontiĝo de Esp.-Familioj, Mühlhausen; 26.7.-4.8. PollandRok, Kostrzyn, Pollando; **28.7.-4.8. 75-a IJK Internacia Junulara Kongreso, Liptovský Hrádok, Slovakio;** 4.-11.8. 92-a SAT-Kongreso (sennaciuloj), Babelono, Hispanio; 6.-16.8. 9-a Festa Semajno, Kastelo Greziljono, Baugé, Francio; 10.-17.8. 69-a Kongreso de KELI (kristanoj), Révfülöp, Hungario; 17.8. Paralela Universo, tutmonde; 17.8.-1.9. Vojaĝo en Kartvelio (Georgien); 23.-26.8. 4-a ABELO Apud-Berlina Esperanta Ludado, Berlin; **24.-31.8. 86-a Itala Kongreso de Esp., Trieste, Italio;** 13.-15.9. Esperanto sur la strando, Gdansk-Sopot, Pollando; 20.-22.9. 7-a Renkontiĝo Esperantistoj en Bjelovar, Kroatio; **20.-22.9. 35-a ARKONES Artaj KONfrontoj en Esperanto, Poznan, Pollando;** **29.9.-2.10. Seminario pri Esp.-mono kaj Esp.-medaloj, Herzberg/Harz;** **3.-6.10. TORPEDO (instruado), Herzberg/Harz;** **2.-6.10. 19-a KoKoLoRES (ludoj), Schwerte;** 12.-14.10. 106-a Japana Esp.-Kongreso, Saitama, Japanio; 17.-20.10. Kongreso de Ĉeĥa Esp.-Asocio, Brno, Ĉeĥio; **1.-3.11. DEB-Verbandsratssitzung, Herzberg/Harz;** 1.-3.11. KKPS Klač-Kunveno Post-Somera, Bodegraven, Nederlando; **8.-10.11. Esp.-Wochenendkurs, Herzberg/Harz;** **13.-15.12. GEA-Klerigmodulo kun Zamenhof-festo, Herzberg/Harz;** 21.-27.12.

Vizito el Brazilo: Dominique Santos kaj Jessica Frazao gastis ĉe ni, 12/2017



Bicikle survoje de Berlino al Lisbono: gastis ĉe ni Lars, Christine, Melanie kaj hundo Najeli, 6/2018

7-a Afrika Kongreso de Esperanto, Bujumburo, Burundo; **27.12.19-3.1.20 11-a JES Junulara Esp.-Semajno, Gliucholazy, Pollando;** ankaŭ dum jarŝanĝo: NR Novjara Renkontiĝo + Luminesk';

Esperanto por progresantoj

De vendredo, la 9-an de Nov., ĝis dimanĉo, la 11-an de Nov. 2018 ni partoprenis seminarion "Esperanto por progresantoj" en Langscheid ĉe la Sorpesee. Ĉi-foje ni nur estis sep partoprenantoj kun la instruisto Harald Schmitz. Ni ĉiuj konis unu la aliajn de la pasintaj kunvenoj. Ni ekzercis gramatikon, solvis enigmojn kaj ludis kune. Tempo pasis fluge kaj ni ĝuis ĉion. Vespere ni konversaciis, kun vino, biero kaj "Hintenhoch". La seminaro estis kiel hotelo, la manĝaĵoj estis tre bongustaj. Ni rendevuos venontan jaron en Novembro. Ni esperas, ke multaj novaj Esperantistoj partoprenos. *Waltraut kaj Klaus Brümmer*



Ĝardena festo ĉe Waltraut kaj Klaus, 8/2018

La muzikistoj de Kajto-kaj Jonny M kun klubanoj en la Sumpflume dum la 14-a Rata Rendevuo kaj jubileo „30 jaroj Ratkaptista Bando“! 11/2017

